

B.Ĵitkov

Pri simieto

Hajfo
2014

Tradukis A.Kerbel

Pri simieto

Boris Ĵitkov (1882 - 1938)

Mi estis dek-du-jara, kaj vizitis lernejon. Foje, dum interleciono, venas al mi kamarado mia, Juĥimenko, kaj diras:

– Ĉu vi volas ke mi donu al vi simieton?

Mi ne kredis: pensis mi ke li tuj iun petolaĵon aplikos, por ke mi lumetojn en la okuloj ekvidu, kaj tiam li diros: «Jen tio estas la simieto». Ne tia mi estas.

– Lasu, – diras mi, – konas mi tion.

– Ne, – li diras, – serioze. Veran simieton. Beletan. Ĝia nomo estas Jaŝka. Sed la patro koleras.

– Pri kiu?

– Pri mi kaj pri Jaŝka. Forigu ĝin, diras li, kien vi volas. Mi pensas ke al vi estus plej bone.

Post la lecionoj ekiris ni al li. Mi ankoraŭ ne kredis. Ĉu vere, pensis mi, havos mi vivan simieton? Senĉese demandis mi kia ĝi estas. Kaj Juĥimenko diras:

– Ja vidos vi, ne timu, eta ĝi estas.

Vere, okazis ĝi eta. Se ekstaros sur la piedetojn, do ne pli alta ol kvardek centimetroj. La muzeleto estis sulka, oldulina, kaj la okuletoj – vivaj, brilaj. Hararo ĝia estis flavruĝa, kaj la manetoj – nigraj. Kvazaŭ homaj manoj en nigraj gantoj. Vestiĝis sur ĝi blua veŝto.

Juĥimenko elkriis:

– Jaŝka, Jaŝka, venu! Rigardu kion mi donos al vi!

Kaj enpoŝigis li la manon. La simieto kriis «Aj, aj!», kaj per du saltoj okazis sur brakoj de Juĥimenko. Li tuj ŝovis ĝin sub la uniforman palton, sur la bruston.

– Iru ni, – diras li.

Mi eĉ ne kredis al miaj okuloj. Iras ni sur la strato, portas tian miraklaĵon, kaj neniu scias kio estas ĉe ni sub la palto.

Laŭvoje Juĥimenko diris per kio oni nutru ĝin.

– Ĉion ĝi manĝas, ĉion donu. Dolĉaĵojn ĝi ŝatas. Precipe bombonojn. Se atingos ĝi ilin, manĝegos ĝis malsano. Teon ĝi ŝatas, estu ĝi malforta kaj dolĉa. Sukeron englasigu. Du pecojn. Aparte ne donu: sukeron ĝi formanĝos, sed la teon ne trinkos.

Mi aŭskultis kaj pensis: eĉ tri pecojn mi ne avaros por ĝi, ja simpatia ĝi estas, kiel miniatura homo.

Ĉi tie mi ekmemoris ke mankas ĉe ĝi vosto.

– Kiu la voston ĝian fortranĉis ĝis la radiko, – ĉu vi?

– Tio estas makako, – diras Juĥimenko, – ili vostojn ne havas.

Venis ni en nian hejmon. La patrino kaj la knabinoj sidis ĉe la tagmanĝo. Mi kaj Juĥimenko eniris eĉ sen demeti la uniformajn paltojn.

Mi diras:

– Ja kio estas ĉe ni!

Ĉiuj ekrigardis. Juĥimenko malbutonumis la palton. Neniu ankoraŭ sukcesis kompreni kio okazis, sed Jaŝka de Juĥimenko salt! sur kapon de la patrino. Depuŝiĝis ĝi per la piedetoj, kaj – sur la telerŝrankon. Tutan hararanĝon de la patrino ĝi malordigis.

Ĉiuj eksaltis, ekkriis:

– Ha, kio, kio estas tio?

Kaj Jaŝka sidas sur la telerŝranko, grimacas, ŝmacas, kaj la dentetojn montras.

Juĥimenko timis ke oni insultos lin, kaj – tuj al la pordo. Sed neniu atentis lin, ĉiuj rigardis la simieton. Kaj subite la knabinoj unuvoĉe ekkriis:

– Kia beleta!

Kaj la patrino daŭrigis la hararanĝon ordigi.

– De kie estas tio?

Mi retrorigardis. Juĥimenko jam forestas. Do de nun mi estas la mastro. Kaj volis mi montri ke scias kiel oni kondukti pri la simieto. Mi enpoŝigis la manon, kaj elkriis, kiel antaŭe Juĥimenko:

– Jaŝka, Jaŝka, venu! Rigardu kion mi donos al vi!

Ĉiuj atendis. Sed Jaŝka eĉ ne alrigardis min; ĝi komencis grati sin rapidritme per la nigra maneto.

Jaŝka ne malsupreniĝis ĝis la vespero. Ĝi

saltis supre: de la telerŝranko sur la pordon, de la pordo sur la vestoŝrankon, de tie sur la fornon.

Vespere la patro diris:

– Ne povas ni lasi ĝin tiel ĝis la mateno: la tutan loĝejon ĝi renversos.

Do mi komencis kapti **na**¹ Jaŝka. Mi al la telerŝranko, – ĝi sur la fornon. Mi ĝin de tie – per balailo; ĝi salt! sur la horloĝon. Deŝoviĝis la horloĝo, kaj haltis. Kaj Jaŝka jam sur la kurteno pendolas. De tie – sur la pentraĵon. La pentraĵo oblikviĝis; mi timis ke Jaŝka sur la pendantan petrollampon ĵetiĝos. Sed tiam jam ĉiuj komencis persekuti na Jaŝka. Oni ĵetis sur ĝin pilkon, bobenojn, alumet-skatolojn, kaj, fine, enpelis ĝin en angulon.

Jaŝka premiĝis al muro, montris la dentojn, kaj klakis per la lango: timigis. Sed oni kovris ĝin per lana tuko, kaj envolvis, implikis ĝin. Jaŝka baraktas, krias, sed oni rapide vindis ĝin tiel, ke nur la kapo restis videbla. Ĝi turnadis la kapon, palpebrumis, kaj ŝajnis ke tuj ekploros ĝi pro la ofendo.

Sed oni ja ne vindu la simieton ĉiuvespere!
La patro diris:

– Alligi. Je la veŝto, kaj al tabla piedo.

1. na: akuzativiga prepozicio. Utilas por konservi rekoneblon de propraj nomoj. Komparu: a) «Ĉu vi konas Ĉeĥovon?». b) «Ĉu vi konas **na** Ĉeĥov?». Propono de sinjoro G.F.Mak-Kink.

Mi alportis ŝnureton, palpe trovis sur dorso de Jaŝka butonon, ŝovis la ŝnureton tra la butontruo, kaj alligis ĝin forte. La veŝto havis tri butonetojn sur dorso de Jaŝka.

Poste mi alportis na Jaŝka, envolvitan, al tablo, alligis la ŝnureton al la tablopiedo, kaj nur tiam disvolvis mi la tukon.

Ho, kiel ĝi eksaltadis! Sed certe ne scipovis ĝi disŝiri la ŝnureton! Iom da tempo ĝi kriis, kolieris, kaj poste eksidis malgaje sur la plankon.

Mi prenis el la ŝranko sukerpecon, kaj donis al Jaŝka. Ĝi kaptis ĝin per la nigra maneto, kaj enŝovis en sub la vangon. Pro tio tuta muzeleto ĝia grimaciĝis.

Mi petis na Jaŝka ke ĝi donu la piedon. Ĝi etendis al mi sian maneton. Tiam mi pririgardis kiel belaj estas ĝiaj nigraj ungetoj. Miniatura viva maneto. Mi komencis karesi la krureton, kaj pensas: ĝuste kiel bebo. Kaj ektiklis mi ĝian etan manplaton. Kaj tiu ĉi bebo elŝiris la maneton, kaj frap! sur mian vangon. Mi eĉ palpebrumi ne sukcesis dum ĝi kelkfoje vangofrapis min, kaj salt! sub la tablon. Sidas ĝi tie kaj montras la dentojn. Jen kia infaneto! Sed tiam oni forpelis min dormi.

Mi volis alligi na Jaŝka al mia lito, sed oni ne permesis tion. Mi kuŝis, penis aŭskulti kion faras Jaŝka, kaj pensis ke oni nepre devas ordigi por ĝi liteton, por ke ĝi dormu kiel homo, sub litkovrilo. Kaj ke la kapon metu ĝi sur litkusene-

ton. Pensis mi, pensis, kaj endormiĝis.

Matene mi elsaltis kaj, senvesta, – al Jaŝka. Forestas Jaŝka. La ŝnureto restis, al la ŝnureto la veŝto estas alligita, sed la simieto forestas.

Vidas mi, ĉiuj tri butonoj surdorsaj estas malbutonumitaj. Do malbutonumis ĝi la veŝton, lasis ĝin sur la ŝnureto, kaj forkuris.

Mi komencis serĉi en la ĉambro. Kuras mi nudpieda. Nenie. Ektimis mi. Kio se ĝi forkuris? Eĉ ne unu tagon ĝi loĝis, kaj jen la rezulto! Mi sur la ŝrankojn rigardis, en la fornon: do forkuris ĝi eksteren. Sed ekstere estas malvarmege: frostiĝos ĝi, mizerulo. Ankaŭ mi eksentis malvarmon, kaj ekkuris vesti min.

Subite vidas mi, baraktas io en mia lito. La litkovrilo moviĝas. Mi eĉ ektemis. Jen kie ĝi estas! Ja sur la planko eksentis ĝi malvarmon, forkuris, kaj – en mian liton. Enŝoviĝis ĝi sub la litkovrilon, sed mi dormis, kaj sentis nenion.

Jaŝka, pro duondormo, ne deflankiĝis, permesis preni sin en la manojn, kaj mi denove vestis sur ĝin la bluan veŝton.

Kiam oni eksidis trinki teon, Jaŝka sursaltis la tablon, ĉirkaŭrigardis, tuj trovis la sukerujon, enigis la kruron, kaj salt! sur la pordon. Saltis ĝi tiel lerte, ke ŝajnis ke ĝi ne saltas sed flugas.

Sur piedoj de simioj estas fingroj, kiel sur homaj manoj, do Jaŝka scipovis kapti ankaŭ per piedoj. Kaj ĝi faris tion. Sidas ĝi, kiel infano, sur ies brakoj, la manetojn kunmetas, sed per la

piedo tiras ĝi ion de sur la tablo. Forŝtelas ĝi tranĉilon, kaj saltas kun ĝi. Por ke oni penu depreni, kaj ĝi forkuradu.

Teon al Jaŝka oni donis en glaso. Ĝi ĉirkaŭprenis la glason, kiel sitelon, trinkis kaj ŝmacis. Mi ja ne ŝparis sukeron al ĝi.

Antaŭ ol foriri en la lernejon alligis mi na Jaŝka al tenilo de la pordo. Ĉi-foje mi ĉirkaŭligis ĝian talion per ŝnureto, por ke ĝi ne liberiĝu. Kiam mi revenis hejmen, jam el la enirejo ekvidis mi per kio okupiĝas Jaŝka: Ĝi pendis sur la porda tenilo, kaj veturadis sur la pordo kiel sur karuselo. Forpuŝiĝas ĝi de la porda fosto, kaj veturas ĝis la muro. Puŝos ĝi la krureton kontraŭ la muron, kaj veturas reen.

Kiam mi eksidis plenumi la hejmajn taskojn, mi sidigis na Jaŝka sur la tablon. Ĝi ege ŝatis varmiĝi apud la petrollampo. Dormetas ĝi, kiel oldulo sub la suno, balanciĝetas, kaj, duonfermante la okulojn, rigardas kiel mi trempas la plumon en la inkon.

Instruisto ĉe ni estis severa, do mi tre pure **pe**²-skribis la paĝon. Uzi sorban paperon mi ne volis, por ne difekti la skribaĵon. Lasis mi ĝin sekiĝi.

Revenas mi, kaj vidas: sidas mia Jaŝka sur la kajero, trempas ĝi la fingreton en la inkujon,

2. Prefikso **pe** utilas por indiki kompletan plenumon, realigon, efektivigon de la ago: konstruis **pe**-konstruis; kuiras **pe**-kuiras; kuracus **pe**-kuracus. Propono.

murmuras, kaj desegnas inkajn kurbaĉojn sur mia skribaĵo.

– Ja kion vi faras, aĉulo vi tia!

Mi preskaŭ ekploris pro la ĉagreno. Ĵetiĝis mi sur Jaŝka. Sed certe sensukcese. Ĝi – sur la kurtenon: malpurigis ĝin tutan per la inko. Jen kial patro de Juĥimenko koleris pri li kaj pri Jaŝka...

Sed foje ankaŭ mia patro ekkoleris pri Jaŝka. Jaŝka deŝiradis foliojn de enpotaj kreskaĵoj, kiuj staris ĉe ni sur fenestra breto. Deŝiras ĝi folion, kaj incitas.

La patro kaptis kaj batis ĝin. Poste li alligis ĝin pune ĉe la ŝtuparo, kiu gvidis al subtegmentejo. Malvasta ŝtupareto estis tio, sed la vasta gvidis de la loĝejo malsupren.

Jen iras matene la patro en la oficejon. Puriĝis li, vestis la ĉapelon, malsupreniĝas laŭ la ŝtuparo. Frap! Stukaĵo falas. La patro haltis, forskuis ĝin de la ĉapelo. Rigardas li supren: neniu. Sed kiam li ekiris: frap! denove peco da stuko, ĝuste sur la kapon. Kio okazas?

Mi staris flanke, kaj vidis kiel fiagas Jaŝka. Ĝi forrompis stukaĵojn de la muro, metis ilin ĉe randoj de la ŝtupoj, kaj ekkuŝetis embuske sur la ŝtuparo: ĝuste super kapo de la patro. Tuj kiam la patro ekiris, Jaŝka per la piedo la stuke-ton de la ŝtupo puŝ!, kaj tiel lerte ĝi celis, ke falis ĝi ĝuste sur ĉapelon de la patro: tiel ĝi venĝis lin pro la pasinttaga batpuno.

Sed kiam komenciĝis vera vintro, kiam ekhurlis vento en la fornotuboj, kaj duonŝutiĝis la fenestroj per la neĝo, ekestis Jaŝka malgaja. Mi ĉiam varmigis, premis ĝin al mi. La muzeleto de Jaŝka iĝis malgaja; ĝi jelpetis kaj premiĝis al mi.

Mi provis enŝovi ĝin sub la jakon, sur la bruston. Jaŝka tuj establiĝis tie: per ĉiuj kvar piedetoj kaptis ĝi la ĉemizon, kaj ekpendis tie, kvazaŭ algluiĝis. Tiel ĝi dormis tie, sen malstreĉi la piedojn. Se forgesas mi iufoje ke havas mi vivan surventraĵon tie, sub la jako, kaj apogas mi min al tablo, Jaŝka tuj per la maneto gratas mian flankon: signas ĝi ke estu mi pli atenta.

Jen foje, dimanĉe, gastis ĉe ni knabinoj. Ek-sidis ni matenmanĝi. Jaŝka trankvile sidis sur mia brusto, kaj estis tute nerimarkebla.

Fine oni disdonis bombonojn. Tuj kiam komencis mi elvolvi la mian, subite el sub la jako, rekte de mia ventro, aperis vila maneto, kaptis ĝi la bombonon, kaj – reen. La knabinoj ekjelpis pro timo. Tio Jaŝka ekaŭdis susuron de la papero, kaj konjektis ke oni manĝas bombonojn.

Mi diras al la knabinoj: «Tio estas mia tria mano; per ĝi mi ŝovas bombonojn rekte en la ventron, por ne trookupiĝi». Sed ĉiuj jam komprenis ke tio estas simieto, ĉar el sub la jako aŭdeblis krako de la bombono: Jaŝka mordis kaj

ŝmacis, kvazaŭ tio estas mi kiu maĉas ĝin per la ventro.

Jaŝka longe koleris je mia patro. Interpaciĝis ili pro bombonoj. Tiutempe la patro ĉesis fumi, kaj anstataŭ cigaredoj portis li en la cigaredujo bombonetojn. Ĉiufoje, post tagmanĝo, la patro malfermis streĉan kovrilon de la cigaredujo per ungo de la dika fingro, kaj elprenis la bombonojn. Jaŝka aperas tuj: sidas ĝi sur liaj genuoj kaj atendas, ŝoviĝas, streĉiĝas.

Jen la patro fordonis foje la tutan cigaredujon al Jaŝka. Jaŝka prenis ĝin en la manon, kaj per la dua, ĝuste kiel mia patro, komencas ĝi per dika fingro malfermi la kovrilon. La fingro ĝia estas et-eta, kaj la skatolfermaĵo – strikta kaj streĉa, do ne sukcesas Jaŝka. Ekhurlis ĝi pro la ĉagreno. Sed la bombonoj klakas. Tiam Jaŝka kaptis dikan fingron de la patro, kaj per ties ungo, kvazaŭ per laborilo, komencis ĝi malfermi la kovrilon. La patron tio ridigis, li malfermis la cigaredujon, kaj proponis ĝin al Jaŝka. Jaŝka tuj enigis tien la manon, plenigis sian manplaton, rapide enbuŝigis la bombonojn, kaj ekkuris for: ja ne ĉiutage venas tia feliĉo!

Estis ĉe ni konatulo-kuracisto. Ege li ŝatis babili. Precipe dum tagmanĝo. Ĉiuj jam pemanĝis, sur lia telero jam malvarmiĝis ĉio, nur tiam li rekonsciiĝas: fojetas, glutas malatente unu-du pecojn:

– Dankon, mi estas jam sata.

Jen tagmanĝas li foje ĉe ni, surpikas terpomon sur la forkon, kaj svingas li tiun ĉi forkon: parolas. Entuziasmiĝis senhalte. Kaj Jaŝka, mi vidas, laŭ apogilo de lia seĝo supreniĝis; alŝteliĝis ĝi, kaj eksidis post la kuracista ŝultro. La kuracisto diras:

– Kaj, ĉu vi komprenas, ĝuste ĉi-momente...

Kaj haltis li la forkon kun la terpomo apud sia orelo; nur por momento. Jaŝka per la maneto deprenis nerimarke la terpomon de la forko; singarde, kiel ŝtelisto. Kaj la kuracisto daŭrigas:

– Kaj imagu vi...

Kaj enigis li la malplenan forkon en la buŝon. Ekhontis li: pensis ke forskuis la terpomon kiam la manon svingis; ĉirkaŭrigardas li. Kaj Jaŝka jam forestas: sidas ĝi en la angulo, sed pe-gluti la terpomon ne sukcesas: en la gorĝo ŝtopiĝis ĝi.

Ankaŭ la kuracisto ridis, sed, malgraŭ tio, ofendiĝis li pri Jaŝka.

Oni ordigis por Jaŝka dormolokon en korbo, kun litotuko, litkovrilo, kuseno. Sed Jaŝka ne volis dormi kiel homo: ĝi volvis tion ĉi sur sin, kaj sidis tiel, simila al birdotimigilo, tutan nokton.

Oni kudris por ĝi robeton verdan, kun pelerineto, kaj ekestis ĝi simila al mallonghare tondita orfeja knabino.

Jen foje aŭdas mi sonoron el apuda ĉambro. Kio estas tio? Enŝteliĝis mi senbrue, kaj vidas:

staras Jaŝka, en la verda robeto, sur breto de la fenestro; per unu mano tenas ĝi petrol-lampan vitraĵon, kaj per la dua – porlampan broson; kaj purigas ĝi per la broso la vitraĵon. Kaj tiel entuziasmiĝis, ke ne aŭdis ke mi eniras. Ja vidis ĝi kiel oni purigas la vitraĵojn, kaj ekis mem provi ĉi tion.

Se oni lasas ĝin vespere ĉe petrollampo, ĝi elturnas la meĉon por pligrandigi la flamon: la lampo eligas fulgon, la fulgo flugas en la ĉambro, kaj Jaŝka sidas kaj muĝas sur la lampon.

Ekestis problemo pri Jaŝka, eĉ enkaĝigon oni pripensis. Mi kaj insultis, kaj batis ĝin. Sed koleri pri ĝi longe mi ne povis.

Kiam Jaŝka volis plaĉi, ĝi iĝis ege tenera, surgrimpis la ŝultron, kaj komencis en la haroj serĉi. Tio signifas: ĝi ege ŝatas vin.

Se volas ĝi elpeti ion, ĉu pomon, ĉu bombonojn, tuj grimpas ĝi sur la ŝultron, kaj komencas zorge priserĉi la harojn per la manetoj: serĉas ĝi, kaj per la ungo gratetas. Nenion ĝi trovas, sed ŝajnigas ke kaptis har-insekton: elmordas ĝi ion el la fingretoj.

Venis al ni foje gastino-sinjorino. Ŝi opiniis sin belulino. Belege ŝi estis vestita. La tuta per silko susuras. Hararaĝo sur ŝia kapo similis ne frizaĵon sed laŭbon: bukloj, bukletoj. Kaj ĉirkaŭ la kolo, sur longa ĉeneto – speguleto en arĝenta kadro.

Jaŝka singarde proksimiĝis al ŝia seĝo.

– Ho kia simpatia simieto! – diras la sinjorino.

Kaj komencis ŝi per la speguleto ludi kun Jaŝka.

Jaŝka kaptis la speguleton, ĉirkaŭrigardis ĝin, kaj salt! sur genuojn de la sinjorino; kaj komencis ĝi la speguleton per la dento kontroli.

La sinjorino forprenis la speguleton, enpremis ĝin en la mano. Sed Jaŝka volas ricevi ĝin.

La sinjorino malzorge karesas na Jaŝka per sia ganto, kaj poiome forpuŝas ĝin de sur la genuoj. Do decidis Jaŝka ekplaĉi, alflatiĝi al la sinjorino: salt! sur ŝian ŝultron. Per la malantaŭaj piedetoj kaptis ĝi forte ŝiajn punktojn, kaj ekokupiĝis pri ŝia hararanĝo. Disfosis ĝi la buklojn, kaj komencis serĉi. La sinjorino ruĝiĝis.

– Iru, iru for! – diras ŝi.

Sed ne! Jaŝka eĉ pli penas: gratetas ĝi per la ungoj, klakas per la dentetoj.

Tiu ĉi sinjorino ĉiam sidiĝis kontraŭ spegulo, por admiri sin; kaj vidas ŝi en la spegulo, ke viligis ŝin Jaŝka; preskaŭ ploras ŝi.

Mi alproksimiĝis por helpi. Sed Jaŝka enkroĉiĝis la harojn per ĉiuj siaj fortoj, kaj rigardas min sovaĝe. La sinjorino kaptis ĝin je la nuko, kaj ruinigis Jaŝka tutan ŝian frizaĵon.

Mi svingis batminace la manon, fortimigis na Jaŝka, kaj nia gastino ĉirkaŭkaptis la kapon, kaj – al la pordo.

– Maldecaĵo, – diras ŝi, – maldecaĵo! – kaj eĉ adiaŭis ŝi neniun.

«Ha!», – pensas mi, – «tenu mi ĝin ĝis la printempo, kaj fordonu al iu, se Juĥimenko ne reprenos. Ja tiom da malagrabraĵoj ricevis mi pro tiu ĉi simieto».

Kaj jen venis printempo. Ekestis pli varme. Jaŝka vigliĝis, kaj ekpetolis eĉ pli ol antaŭe. Tre volis ĝi al libero, en la korton.

La korto ĉe ni estis vastega, preskaŭ hektara. Centre de ĝi estis amasigita fiska karbo, kaj ĉirkaŭe staris deponejoj kun varoj. La kortgardistoj tenis aron da hundoj, kontraŭ ŝtelistoj. La hundoj estis grandaj, koleraj.

Ĉefa inter ili estis flavruĝa virhundo Kaŝtan. Kiun Kaŝtan almuĝos, sur tiun ĉiuj hundoj ĵetiĝas. Kiun Kaŝtan preterlasos, ankaŭ aliaj hundoj ne tuŝas. Fremdan hundon batis Kaŝtan kure, per la brusto. Batas li, faligas de sur la piedoj, staras super ĝi kaj muĝas; sed tiu eĉ moviĝi timas.

Mi enrigardis la fenestron, kaj vidas: forestas la hundoj en la korto. Nu, pensas mi, iru mi unuafoje promeniĝi na Jaŝka. Mi vestis sur ĝin la verdan robeton, por ke ĝi ne malvarmumiĝu, kaj sidigis ĝin sur mian ŝultron. Tuj kiam malfermis mi la pordon, Jaŝka sur la teron salt! kaj ekkuris ĝi en la korto.

Sed, subite, aperis la tuta hundaro, Kaŝtan antaŭe, kaj rekte al Jaŝka. Kaj ĝi, la etulo, kiel

verda pupeto staras. Mi jam ekpensis ke pereis Jaŝka: tuj oni disŝiros ĝin.

Kaŝtan ŝoviĝis al Jaŝka. Sed Jaŝka turniĝis al ĝi, kaŭris, taksis la distancon. Kaŝtan haltis je unu paŝo de la simieto, nudigis la dentojn, grumblas, sed ĵetiĝi sur tiun ĉi miraklaĵon ne decidiĝas.

Ĉiuj hundoj hirtiĝis, kaj atendas reagon de Kaŝtan. Mi estis jam preta ĵetiĝi por savi na Jaŝka. Sed subite ĝi saltis, kaj unumomente ek-sidis nukon de la hundo. Flokoj da haroj ekflugis de sur Kaŝtan. Jaŝka batis ĝian muzelon kaj okulojn tiel rapide, ke kruroj ĝiaj ekestis nevideblaj.

Ekjelpis Kaŝtan pro la timego, kaj tiel terure, ke ĉiuj hundoj diskuris. Ĵetiĝis Kaŝtan kuregi, sed Jaŝka sidas, enkroĉiĝis per la piedoj en la nukon, tenas sin firme, kaj per la manoj tiras ĝi orelojn de Kaŝtan, elŝiras flokojn da haroj. Kaŝtan freneziĝis: kuras li ĉirkaŭ la karba monto, kaj hurlas sovaĝe. Du- tri-foje ĉirkaŭrajdis Jaŝka la korton, kaj desaltis de la kuranta hundo sur la karbon. Algrimpis ĝi senhaste la supraĵon. Tie staris ligna budo; surgrimpis Jaŝka la budon, eksidis, kaj komencis grati siajn flankojn kavazaŭ okazis nenio: jen, kia mi estas! Sed Kaŝtan, tra la pordego, ĵetiĝis for de tiu ĉi terura besto.

De tiam mi kuraĝe lasis na Jaŝka en la korto: Jaŝka de la peroneto, – ĉiuj hundoj al la

pordego. Jaŝka timis neniun.

Kiam enveturis la korton ĉaroj, la tutan korton ili plenigis, eĉ trairi estis malfacile. Sed Jaŝka de ĉaro al ĉaro flugas. Sursaltas ĝi dorson de ĉevalo; la ĉevalo prancas, la kolharojn skuas, snufas. Sed Jaŝka senhaste jam la alian sursaltas. La ĉaristoj nur ridas kaj miregas:

– Rigardu kia diablo saltas. Ha! Hop!

Kaj Jaŝka – sur la sakojn. Serĉas ĝi truetojn. Enigas la maneton, kaj palpe esploras kio estas tie. Trovas ĝi kie estas sunfloraj semoj, kaj tie, sur la ĉaro, sidas kaj kraketas ilin. Okazis ke eĉ nuksojn alpalpas Jaŝka. Ŝtopas ĝi tiam la subvangojn, kaj ankaŭ ĉiujn kvar manojn penas plenigi.

Sed jen aperis malamiko. Kaj kia! En la korto estis virkato. Nenies. Li loĝis ĉe kontoro, kaj ĉiuj nutris lin per manĝrestaĵoj. Li grasiĝis, kaj ekestis granda kiel hundo. Malica li estis kaj gratema.

Kaj jen foje, antaŭvespere, promenis Jaŝka en la korto. Mi ne sukcesis alvoki ĝin en la hejmon. Vidas mi, eniris tiu ĉi katego la korton, kaj salt! sur benkon, kiu staris sub la arbo.

Jaŝka, kiam ekvidis la katon, – rekte al li. Fleksis ĝi iom la krurojn, kaj iras nerapide sur la kvar piedoj. Rekte al la benko; kaj ne forigas ĝi la rigardon de la kato. La kato kuntiris la piedojn, ĝibigis la dorson, pretiĝis. Sed Jaŝka proksimiĝas. La kato elstreĉis la okulojn,

retroiras. Jaŝka – sur la benkon. La kato daŭre moviĝas retren, al alia flanko, al la arbo.

Ĉe mi la koro haltis, sed Jaŝka jam sur la benko iras, al la kato. La kato kuntiriĝis la tuta, kaj subite salt! sed ne sur Jaŝka, sur la arbon. Enkroĉiĝis li la arbotrunkon, kaj rigardas la simieton desupre. Kaj Jaŝka, sammaniere, proksimiĝas jam al la arbo.

La kato ekungis supren: al kutimiĝis li sur arboj saviĝi. Ankaŭ Jaŝka – sur la arbon, same nehaste; kaj celas ĝi la katon per siaj nigraj okuletoj.

La kato supren, supren, enrampis li branĉon, kaj eksidis sur ties ekstremo. Rigardas li kion Jaŝka faros. Kaj Jaŝka laŭ la sama branĉo grimpas, kaj tiel memfide, kvazaŭ nenion alian ĝi faris, de sia naskiĝo mem, nur katojn ĉasis. La kato jam apenaŭ teniĝas sur maldika branĉeto, balanciĝas. Sed Jaŝka grimpas kaj grimpas, lerte paŝas per ĉiuj kvar siaj manetoj.

Subite la kato salt! de la arbosupro sur la pavimon; skuiĝis li, kaj plenrapide – for, eĉ sen retrorigardi. Kaj Jaŝka de la arbo krias al li: «Jaj, jau!» – per iu besta timiga voĉo; neniam aŭdis mi tian de ĝi.

De tiam Jaŝka ekestis vera reĝo en la korto. Hejme ĝi jam konsentis manĝi nenion, nur trinkis teon kun sukero. Kaj foje tiom da sekvinberoj formanĝis ĝi en la korto, ke ekestis problemo savi ĝin.

Jaŝka ĝemas, larmoj sur la okuloj, kaj ĉiujn ĝi rigardas kaprice. Ĉiuj, komence, tre kompatis ĝin, sed Jaŝka, kiam rimarkis ke oni tiel okupiĝas pri ĝi, komencis afekti, disĵeti la manojn, retroklini la kapon, kaj hurli diversvoĉe.

Oni decidis volvi ĝin kaj doni ricin-oleon. Por ke ellernu ĝi ion. Sed la ricinoleo tiel ekplaĉis al Jaŝka, ke ĝi komencis postulaĉi ke oni donu ankoraŭ iom da ĝi. Oni ĉirkaŭvolvis na Jaŝka, kaj dum tri tagoj ne permesis viziti la korton.

Post nelonge Jaŝka resaniĝis, kaj komencis postuli la kort-promenojn. Mi jam ne timis pri ĝi. Kapti ĝin povis neniu, kaj Jaŝka tuttage saltis en la korto. Hejme ekestis pli trankvile, kaj malpli da insultoj ricevis mi pro Jaŝka. Sed kiam venis aŭtuno, ĉiuj en la hejmo – unuvoĉe:

– Forigu vi vian simieton kien vi volas, aŭ enkaĝigu ĝin. Sed en la ĉambroj tiu ĉi diablo ne saltadu.

«Antaŭe ili diris kia beleta ĝi estas, sed nun», – pensas mi, – «ekestis ĝi diablo».

Do tuj, kiam komenciĝis la lernado, ekis mi serĉi en la klaso al kiu fordoni na Jaŝka.

Trovis mi fine kamaradon, vokis lin flanken, kaj diras:

– Ĉu vi volas ke simieton mi donacu al vi? Vivan.

Mi jam ne scias al kiu li poste fordonis na Jaŝka. Sed unuatempe, post kiam Jaŝka ek-

forestis, mi vidis ke ĉiuj iom bedaŭras, kvankam
konfesi pri tio volis neniu.

1927.